

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1999:3

*Aktiva aktiviteteter
Ĉe-mineja kongreso*

Debato: Kien La Espero?



Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Sept. 1999 • 87-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktör:

Jan Setréus

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Redigering/layout: Hans Oldhage

Tryck: HA Reklamtryck AB, Stockholm

Prenumeration 1999: 180 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i
medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3,
Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se
www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1999:

Direktansluten medlem 180 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 90 kr. Medlemmar under
30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund.
Hel familj 270 kr (Inkl. 1 ex. av *La Espero*. Tilläggsex.
kostar 90 kr).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Hemsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manusstopp den 1/11

Manus till La Espero

sänds till Jan Setréus

Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden

tel./fax 08 - 717 75 67

e-post: jan.setreus@2.sbbs.se

PÅ SPRÅKFRONTEN INTET NYTT

Hans Bergström, chefredaktör för Dagens Nyheter i Stockholm skriver i en artikel den 1/8 om språkproblemen i Europa, i synnerhet inom EU. Han påminner sig sin egen hembys dialekt och vilka problem den dialekten innebar för honom utanför den egna byn. Den var en av orsakerna till "kulturell distans", den "försvarade kommunikation" och förorsakade det handikapp stamning innebär.

Bergström fastslår: "Det vore en välsignelse om mänskligheten hade ett gemensamt språk, så att vi kunde ägna vår möda åt att förstå vad vi menar, inte bara vad vi säger." Med hänsyftning på en artikel i Svenska Dagbladet av Margareta Westman och Ulf Teleman säger Bergström: "Det vore inget framsteg att via EU få en svenska genmanipulerad av fransk förvaltningskultur, tysk meningsbyggnad och engelsk jargong."

Som EU idag fungerar, eller borde fungera, har man 11 officiella språk, vilket medför 110 olika kombinationer av språk för tolkningar; från svenska till portugisiska, från portu-

gisiska till svenska, från grekiska till finska osv. Med utvidgning av EU österut ökar antalet kombinationer dramatiskt. Vid 25 språk blir det 600 kombinationer.

Ett alternativ vore "relä-tolkning", tolkningen sker via ett visst "bro-språk". Det leder emellertid till tidsfördröjning och att nyanser försvinner i två led.

Bergström konstaterar att "ingen uttrycker sig lika tryggt och nyansrikt på ett främmande språk som på sitt modersmål." Med tolkning går alltid mycket förlorat. Sedan frågar sig Bergström trots sitt eget konstaterande omedelbart därefter om det inte vore bättre att övergå till engelskan som alla i EU "förväntas tala och förstå". Här anar man en svacka i resonemanget beroende på en "nedärvd" svensk syn på språkfrågan. Bergström till heders ska dock sägas att han lämnar frågan öppen genom att avsluta med "Har svenska statsråd någon uppfattning? Några uppslag? Speak out!". Kanske någon av våra läsare har ett bra svar?

RED

**ESPERANTOFÖRBUNDETS
STYRELSE**

Ordförande: Roland Lindblom,
Stenbockens g. 102, 136 62
Haninge, tel. 08-7774175
roland@esperanto.nu

Vice ordförande: Franko Luin,
Myggdalsv. 123, 135 42 Tyresö, tel.
08-712891, franko@omnibus.se

Sekreterare: Boo Mee Lindblom,
Stenbockens g. 102, 136 62
Haninge, tel. 08-7774175,
boomee.kimlindblom@swipnet.se

Kassör: Börje Andersson, Ingeg. 4A,
541 50 Skövde, tel. 0500-412205

Ordinarie Ledamöter: Bengt
Nordlöf, Boforsg. 23, 123 46 Farsta,
tel. 08-934170

Håkan Lundberg, Fisksätra torg
12 4tr, 133 41 Saltsjöbaden, tel. 08-
7177869,

hokan.lundberg@telia.com
Wim Posthuma, Soldatg. 40, 723
45 Västerås, tel. 021-133529,
wimp@quicknet.se

Suppleanter: Jan Setréus, Mörtg. 7
SV, 133 43 Saltsjöbaden, tel. 08-
7177567, jan.setreus@2.sbbs.se
Kjell Randehed, Ragnvallag. 30C,
256 63 Helsingborg, tel.042-155969
ttt@telia.com

SEJU:S STYRELSE

Ordförande: Håkan Lundberg,
Fisksätra torg 12, 4tr, 133 41
Saltsjöbaden, tel. 08-7177869,
hokan.lundberg@telia.com

Vice ordförande: Lovisa
Gustafsson, Slättevalla, Nolgården
1, 540 66 Sjötorp,
miaujo@hotmail.com

Sekreterare: Keiko Snarberg,
Briljantg. 12, 421 49 Västra
Frölunda, tel. 031-7090039,
keiko@esperanto.nu

Vice sekreterare: Jessica Hanmeier,
Vindögatan 37, 257 33 Rydebäck,
trilingo@usa.net

Kassör: Fredrik Olofsson, Idrottsv.
19 B, 461 40 Trollhättan, tel. 0520-
10656, fredrik@esperanto.se

Övriga ledamöter:

Anna-Lena Eriksson, Harald
Stakegatan 20, 415 01 Göteborg,
tel. 031-25 64 61, anna-lena.eriksson@telia.com

Janko Luin, Myggdalsv. 123,
135 42 Tyresö, tel. 08-7128291,
janko@esperanto.se
Henrik Randehed, Ragnvallag.
30 C, 256 63 Helsingborg, tel. 042-
155996, randehed@usa.net;
aktiva.esperantoklubo@helsingborg.mail.telia.com

Aktiva aktiviteter

Första sommarkursen i klubbstugan

TEXTER PÅ SIDAN:
KJELL RANDEHED

Till den spontana sommarkursen i Helsingborg samlades inte mindre än åtta vuxna och fyra barn. Vi beslöt att dela upp oss i två grupper och till cirkelledare för barngruppen blev en tidigare elev på Olympiaskolan, Anna Bynkenheim.

Kursen ägde rum dels i klubbstugan Aktiva Aktivejo och leddes av Kjell Randehed och barngruppen i koloniföreningens samlingslokal på samma område. Under tio måndagsförmiddagar samlades man i gemtlig samvaro för att i kamratcirkelform ta de första stegen i esperantovärlden.

Att driva sommarkurser på ett koloniområde var ett lyckat grepp. Det är just på koloniområden som barnfamiljerna finns på somrarna och man har tid att koppla av och ägna sig åt esperanto. Kursen kom till spontant och utan föregående annonsering.

Frågan är nu om det blir en fortsättning till hösten och en ny sommarkurs nästa år. Som läromedel användes Lars Forsmans "Egaleco Kaj Paco" och för första gången använde man även det nya röda övningshäftet av samma författare.



Som synes samsades de flesta generationer när Aktiva-klubben i Helsingborg hade sommarkurs. Längst till höger Aktiva Esperantoklubbs ordförande Kjell Randehed. Observera den lilla esperantoflaggan!

Foto: Jessica Hanmeier

Flaggprotest när klubbstugan invigdes

På själva midsommarafton i Helsingborg, passade Aktiva Esperantoklubo på att "inviga" sin klubbstuga "Aktiva Aktivejo". Närmare ett 20-tal personer totalt, samlades för att avnjuta ett icke alltför traditionellt midsommarbord.

Bland annat nfann sig gäster från Stockholm, Hasse Oldhage och Janko Luin, samt ordföranden för Helsingborgs Esperantoförening, Ann-Louise Åkerlund, som överlämnade en klematisplanta att plantera i rabatten vid väggen utanför själva klubbstugan. Hon önskade oss lycka till och att vår klubb skulle växa ikapp med plantan.

Som underhållning hade vi en egen orkester, framtagen enbart för denna fest, och som framförde kända melodier med olika esperantotexter. Sammansättningen var Kjell Randehed på elgitarr, Jessica Hanmeijer, elbas och trumpet, Eamon Hanley, trummor, och Siri Hanley, sång.

Vi hissade också upp den gröna esperantoflaggan i egen flaggstång, tills vi av koloniföreningen blev anmodade att ta ner den, för – som man uttryckte saken – den gröna flaggan störde de övriga kolonisternas midsommarfirande...

Eftersom vi är fridsamma själar så orkade vi inte bråka, utan tog utan prut ned flaggan. Längre än så här har man alltså inte kommit på årtusendets sista midsommarafton ifråga om tolerans, jämlikhet m.m.



–Hoppas klubben växer ikapp plantan, säger Esperantoföreningens ordförande i Helsingborg, Ann-Louise Åkerlund, till Kjell Randehed,.

Foto: Gabriella Mastmeier

Andelar i Aktiva Aktivejo

I vår klubbstuga, som av en portugis föreslogs heta Aktiva Aktivejo, kan man även köpa andelar à 100 kr, enligt känd Lesjöforsmodell som tillämpas på Esperantogården.

För att bli "Patrono" är vi betydligt billigare, det kostar nämligen endast 1000 kr. Vi har redan tre stycken "Patronoj" och har plats till många till. Varje andelsägare kommer att få ett snyggt andelsbevis som för närvarande är under utformning.

Från och med år 2000 kommer att kunna ta emot fyra övernattande ungdomar från hela världen inte är en lokal angelägenhet utan både en nationell och internationell! Då ommer vi att finnas med i både Amikeca Reto och Pasporta Servo. Var med även du och stöd den aktiva delen av esperantorörelsen. Köp andelar nu!

Betalning sker lämpligast genom att sätta in pengar på Pg: 465 60 49-6. Betalningsmottagare: Aktiva Esperantoklubo. Ange även att betalningen avser andelar.

Styrelsen för Aktiva Esperantoklubo de Helsingborgo

Nova ordo en nia biblioteko

De Anita Dagmarsdotter

POST JARO DA LABORO fine eblas kunmeti iom da spertoj kaj faktoj pri la biblioteko de SEF. Estis kaj estas interesa laboro por mi, kiu ĉiam havis specialan rilaton al literaturo kaj libroj.

Dum dek unu monatoj mi havis eblecon labori plentempe kun la biblioteko. Restas ankoraŭ multe, sed jen kaj jen mi daŭre

La bretaro enhavis skatolojn kun iom konata enhavo, skatolojn kun tute nekonata enhavo, stakoj da libroj, vicoj da libroj.

Kio mankis estis spaco. Ole Hansen, kiu dum kelka tempo zorgis pri la libroj, estas svelta persono, mi male. Mankis spaco en la bretaro mem por meti librojn dum

okuloj fiksiĝis ĉe libroj erare metitaj en cetere ordigita aro da libroj.

Mi ne scias, kiu en ordo mi estas, ordigante la bibliotekon. Pluraj miaj antaŭuloj faris pli-malpli proprajn sistemojn por la ordigado kaj klasifiko de la libroj. Mi povis parte uzi la laboron faritan, sed mi pli-grandigis la registron, la bildon de la libro, metante informojn pri subtitoloj, eldonintoj, ilustrintoj kaj uzante la ordinaran svedan (SAB) kaj la internacian (UDK) sistemojn, kune kun esperanta sistemo por klasifi lernolibrojn, vortarojn kaj librojn pri la movado.


DIVERSAJ ORDIG-SISTEMOJ

Kial uzi tiom da diversaj sistemoj? Esperable la laboro ne estas ne-necesa. En la bretaroj la libroj estas ordigitaj laŭ la sveda sistemo. La svedoj rekonas ĝin kaj povas trovi librojn pri certa temo en la sama loko kiel en ordinara biblioteko. Ekzistas sistema katalogo laŭ UDK, la internacia sistemo, kiu helpas al eksterlandanoj trovi la temon, kiun ili serĉos.

En Lesjöfors mi ordigis librojn kaj notis en la kelo dum semajnoj. Veturis hejmen por enkomputerigi la notojn kaj fari etiketojn por la libroj. Reiris al Lesjöfors por surglui la etiketojn kaj meti la librojn en la bretaroj, ankaŭ translokigitaj de Esperanto-Centro.

Se restas fortoj mi skribos aŭtune iom pri libroj, kiujn mi trovis en nia biblioteko.

Dankon al tiuj kiu ebligis miajn vizitojn en Stockholm: Soile Lingman, Edith Köhler, Nils-Erik Kristoferson kaj neesperantaj amikinoj, kiuj loĝigis min dum laborvizitoj. Kaj dankon al Lennart Svensson, kiu kuiris preskaŭ ĉiutage en Lesjöfors.



Jen mi staranta pozante antaŭ la fotisto, ŝajngiganta meti libron sur breton.

Foto: Jan Setréus

registas librojn. Kio mankas estas katalogoj, kiujn mi pretas liveri nur post revizado de spertuloj, nome Martin Weichert kaj Inga Johansson. Necesa estas ankaŭ manlibro por miaj posteuloj, ankoraŭ nekonataj. Kaj espereble, la registrado neniam ĉesos, sed nia biblioteko kreskos.

Dum multaj jaroj bonŝanco helpis por retrovi certan objekton en la biblioteko. Simple ne troviĝis homoj kun la intereso kaj la tempo por trakti la librojn. Mi parolas pri libroj, sed vi komprenu tion kiel libroj, revuoj, bultenoj, broŝuroj. Por milpaĝa libro kaj kvarpaĝa broŝuro necesas la sama laboro. La diferenco estas, ke eblas porti multe pli da broŝuroj ol libroj samtempe. Kaj tiu laboro multe temis pri portado.

LOKO POR SVELTA PERSONO

Esperanto-Centro estas malgranda kaj la bretaro kovris pli ol la duono de la pli malgranda ĉambro. La bretaro staris ĉe unu muro, rektangule al ĝi. Stakoj da skatoloj kovris la spacon ĉe la alia muro, de la planko ĝis mia nazpinto. Inter la stakoj kaj la bretaroj estis spaco nur por singarde trapasi.

ordigado. Mankis spaco inter la bretaroj por labori, por libere turni sin. Mankis spaco por libere pasi preter la bretaro. Por mi ne eblis labori inter la bretaroj. Do, mi portis la librojn al libera spaco. Po-foje eta stako da libroj super la kapo por povi pasi en la malvasta spaco inter bretaro kaj skatoloj. Tio funkciis dum kelka tempo, sed fine mia tuta korpo kaj menso reagis. Ĉiuj libroj, konataj kaj nekonataj, estis transportitaj al Lesjöfors.

EL DUONĤAOSO AL IA ORDO

Mia antaŭulo Ole faris grandan laboron en Esperanto-Centro, kiam li malpakis kaj ordigis librojn post la lasta translokigo. Nu, li ordigis, laŭ sistemo heredita, librojn en la bretaro. Li registris mi-ne-scias-kiom-da libroj, sed bedaŭrinde lia komputora sistemo ne estis legebla por mia komputoro. Nu, Roland Lindblom trovis, nekompletan, kartaron iam faritan de Sven Alexandersson. Tiu estis la fundo por mia registrado. Tiun laboron mi faris en mia hejmo. Per la kartaro kaj la fizika ordigo de libroj farita de Ole, mi havis kernon, ĉefe konsistanta en beletro, per kiu mia laboro progresis. Sed daŭris ĝis mi trovis tion, ĉar miaj

FAKTA OM BIBLIOTEKET

Esperanto-Gården i Lesjöfors hyser huvudparten, som referensbibliotek.

Ett lånebibliotek på, hittills 700 böcker/tidskrifter/broschyrer, finns på Esperanto-Centro i Stockholm.

Ca 2 000 titlar är registrerade, varav ca 75% kommit på plats.

1 516 böcker är nu registrerade på Lesjöfors, varav ca 1 000 är klara.

Ca 500 är under arbete och ett ökande antal, troligen mellan 500 och 800 böcker till, skall registreras.

Komplett katalog skall komma att finnas på båda platserna.

Impresoj el Lesjöfors

Av Wim Posthuma

LA ĜIS NUN PLEJ MALGRANDA kongreso, laŭ mi, de la svedaj esperantistoj sen eksterlandaj samideanoj okazis en nia propra Esperanto-kursejo en Vermlando de la 22a ĝis la 24a de majo kun ĉirkaŭ 55 aktivaj partoprenintoj. Ili de du grandaj kluboj, nome Norrköping kaj Malmö, tute mankis.

Ne nur okazis la grava jarkunveno de la Sveda Esperanto-Federacio, sed ankaŭ tiuj de Eldona Societo, de la sveda sekcio de la Kristana Esperanto-Ligo, kiu ankaŭ aranĝis la religian duonhoron, kaj la sveda sekcio de la Internacia ligo de Esperantistaj Instruistoj.

La anoncita prelego pri la konata sveda verkisto Stellan Engholm, kiu naskiĝis antaŭ 100 jaroj, ne okazis, ĉar estis tro da debatoj dum la jarkunveno de SEF.

Sed la prelego pri la trioble handikapita Harald Tillander de Birger Viggen, ankaŭ blindulo, estis alte taksita.

LA MUZIKON PRIZORGIS la esperantista geedza paro Andrej kaj Nataŝa Berce. Mi montris la nederlandan televidan filmon "La postlasaĵo de doktoro Zamenhof" kaj klarigis la partojn de la filmo kiuj estis en la nederlanda.

Unu LKK-ano, Lennart Svensson, ĉiam

troviĝis en la kuirejo kaj kune kun Anita D, Kitty, Lisbet kaj aliaj, preparis por ni bon-gustajn manĝaĵojn.

Troviĝis diversaj budoj kiel la libroservo de SEF.

Okazis ankaŭ kunveneto de nova redaktoraro de la nacia revuo La Espero, ĉar Franko Luin, kiu estis la teknika redaktoro dum 30 jaroj ne plu povas okupiĝi pri la revuo. Sub gvido de Jan Setréus ili provos pli malmultekoste kaj pli regule pretigi la nacian informilon ol antaŭe.

LONDON, LA DUAN TAGON de pentekosto, ni partoprenis en tre interesa ekskurso al la mineja muzeo Nordmark en la belaj ĉirkaŭaĵoj tre apude la Esperanto-kursejo.

La plej multaj veturis per la konata ruĝa buso de la Stokholma loka trafiko kun propra ŝoforo Ole, membro de la klubo en Upplands Väsby.

La onta kongreso okazos en alia sveda metropolo Helsingborg dum pasko 2000, pli proksime al la eŭropa civilizacio. Urbo kiu eĉ havas du klubojn. La junulara klubo certe havas interesajn planojn por tiu kongreso.

Dum la kongreso estis montrita la Hollywood-filmon Incubus de 1965, la nura

filmo de 75 minutoj, kiu utiligas Esperanton en la dialogoj. William Shatner estas la ĉefrolulo en filmo kiu temas pri la bono kaj la malbono kiel en la Faust-temo: la belaj virinoj estas fakte demonoj sen animo, kiuj volas neniigi la homojn kiuj havas animon.

NE BONA FILMTEMO dum kongreso de idealistoj kaj la okazantaĵoj en Balkano. Sed por ni esperantistoj la filmo estas interese, ĉar la titoloj, rubrikaj en la komenco kaj la paroladoj estas en Esperanto elparolitaj de aktoroj, kiuj ne havas la kutimon paroli Esperanton. Ofte la akcento estas je la malĝusta silabo kaj la prononcado tute ne komprenebla, sed ĝenerale sufiĉe bone. La anglaj subtitoloj ankaŭ helpis iom.

Kial la reĝisoro elektis Esperanton? Oni volis uzi lingvon kiu ne havas ligan kun iu lando. La distribuanto de la filmo fakte ne ŝatas ke la esperantistoj rigardas la filmon, ĉar okazis ke ili tiel ridis pri la malbona prononcado kaj tiel maltrafis la esencon de la filmo.

Post la montrado okazis demandoj. Franko Luin provis respondi, ĉar li mal-krovris la filmon en la reto.



Multe da bela muziko kaj kanto ni povis ĝui pere de la geedza paro Andrej kaj Natalia Berce. Wim Posthuma vid mikrofonon.

Foto: Jan Setréus

Ĉe-mineja kongreso

De Jan Setréus

LA DUAN FOJON SEF ARANĜIS SIAN KONGRESON EN ESPERANTO-GÅRDEN EN LESJÖFORS, KAJ LA DUAN FOJON "NIA DILIGENTA KOLEGARO" GVIDATA DE LENNART SVENSSON MONTRIS KE EBLAS ARANĜI SUKCESAN KONGRESON TIE. LA UNUA FOJO MI ESTIS TIE, KAJ LA UNUAN FOJON DUM MULTAJ JAROJ MI PARTOPRENIS SEF-KONGRESON. PETITA SKRIBI ARTIKOLON PRI ĜI MI TIAL AKCEPTIS.

Mi iris per la aŭtobuso kiun kondukis Ole Hansen, esperantisto kaj profesia ŝoforo, de Esperanto-Centro en Stokholmo matene la sabaton. Norde de Stokholmo ni trovis Bertil Nilsson ŝarĝita de peza dorsosako, kaj kompateme enlasis lin en la buson. Sen la helpo de radioondoj ni eĉ trovis Wim Posthuma en Västerås, kaj daŭrigis la vojaĝon, nun pli malpli 22 personoj. La malkongruo inter la nombro da pasaĝeroj sur la listo kaj en la buso unue kaŭzis maltrankvilon, sed dum la vojaĝo ni parolis kaj ridetis, babilis kaj ridis, babiladis kaj ridegis kaj baldaŭ forgesis ĉiajn malkongruojn. Ni alvenis Lesjöfors horon kaj duonon antaŭ la solena malfermo de la kongreso. . . kaj kvin minutojn antaŭ la malsolena fermo de la ununura vendejo. Mi kuris kun aliaj frandemuloj al la vendejo por provizi min per stoko de fruktoj.

KURAĜO ALPAROLI LENNART

Mi kaj aliaj timiduloj ne kuraĝis alparoli Lennart Svensson dum la lunĉo. Nur plurajn horojn (aŭ ĉu tagojn?) poste, kiam mi vidis lin sen ambaŭ manoj ŝarĝitaj per teleroj, pletoj, bovloj kaj similaj, la unuan fojon preskaŭ senmove mi aŭdacis saluti lin. Li kompreneble estis tre okupita kuirante pladojn por kaj vegetaranoj kaj karnivoroj. Same bongusta kiel estis la manĝaĵoj, same bone adaptita al la kongresaro estis la manĝejo. Partoprenis laŭ la listo, ĉi-foje la tutlanda listo, 45 esperantistoj, kiuj okupis la, laŭ mia nuna takso, 45 seĝojn de la manĝejo.

Malgraŭ la plena sukceso de ĉi tiu kongreso, ĝi eble postlasos en mia animo amaran guton de malvido pri listoj. La menciita listo diras nenion pri la ĉeesto de Lennart Svensson, ĝi ne malkaŝas la partoprenon de Hans Oldhage (kiu fuĝis al Norvegio, verŝajne ĉar li antaŭsentis ke oni elektos lin al du postenoj) aŭ Martin

Weichert, ĝi ne elspiras la knabinan nomon kiun Janko Luin preferas aŭdi k.t.p. Ĝusta aŭ ne la listo tamen indikas du kategoriojn de partoprenantoj; stokholmanoj kaj alioj. La esperantistoj de Norrköping estis en Tallinn, eĉ ne la honoro reprezenti la klubon en Lesjöfors allogis iun iri okcidenten. Cetere la koincido de la du aranĝoj estis diskutita sub la unua punkto dum la jarkunveno, pri "ĝustatempa alvoko".

AŬKCIO KAJ TRANSPIRANTO

Nia prezidanto Roland Lindblom inaŭguris la kongreson en la Popola domo, kaj nin alparolis ankaŭ la prezidantino de la komunumo de Filipstad. Ŝi ankaŭ donis plurajn donacojn al SEF. Ankaŭ Bengt Nordlöf kiel reprezentanto de Esperanto-Gården bonvenigis nin.

Ankoraŭ en la Popola domo Franko Luin aŭkciis librojn en Esperanto. La mini-

ajoj, pli malpli seriozaj. Martin Weichert deklamis poemojn en lingvo kiu ne komplete sukcesis transpaŝi la kulturajn barilojn, transpiranto. Feliĉe li ankaŭ prezentis tradukojn en pli vaste konata lingvo, esperanto. Franko Luin raportis pri seminario en Bruselo titolita "La rajto al Internacia Lingvo ene de jaro 2020", aranĝita de i.a. la Radikala Partio. Plej influis la etoson en la manĝejo dum la vespero tamen Andrej kaj Natalia Berce kiuj ludis kaj kantis svedan kaj internacian muzikon. Ili ankaŭ dancigis esperantistojn tiel ke oni devis rearanĝi la meblojn plurfoje.

ESPERANTO-CENTRO KAJ ESPERO

La plej grava manĝo, la matenmanĝo, tiklu la gustoburĝonojn kaj karesu la stomakon. Lennart kaj liaj asistantoj helpis ĉiujn kontentigi siajn nutrokanalojn dimanĉe matene. Post la matenmanĝo KELL aranĝis religian duonhoron. Leif Norden-



På kongressens sista dag besökte deltagarna magnetitgruvan i Lomasberg (Nordmarks gruvor). Gruvorna i Nordmark är från 1200-talet och brukades till 1980. Foto: Jan Setréus

muma oferto estis unu selmo (20 kronoj). La ĉe-podia tablo estis unue plena da libroj. Eĉ ne muŝo povus trovi lokon inter la libroj por povi eduki sin, eble kulo jes sed muŝo ne. Kiam estis jam venditaj ĉiuj libroj escepte de kelkaj kiuj ne trovis aĉetinton, Franko denove provis vendi tiujn, kaj sukcesis. Antaŭ vespermanĝo sabate ankaŭ okazis la jarkunveno de la Eldona Societo de Esperanto. Bertil Nilsson vigle estris ĝin. Oni i.a. parolis pri la kvina volumo de la Etimologia Vortaro kaj pri la Esperanto-sveda vortaro.

La vesperon sabate ni dediĉis al distr-

storm ne povis partopreni ĉi-jare, sed Arne Lundkvist informis ke la paroĥestro Leif tamen kontribuis skribe.

La cetera antaŭtagmezo laŭ la programo estus dediĉita al la jarkunveno de SEF dum unu horo kaj prelego pri Stellan Engholm dum unu horo kaj duono. Unu horo por la tuta jarkunveno kompreneble ne sufiĉis, kaj sekve la aŭtoro Engholm devis unue flankenŝovi sin kaj poste tute nuligi sin. Sub la profesieca prezido de Ulla Luin ni tamen flue traktis punkton post punkto.

La maltrankviliga stato de nia ekonomio

influis niajn diskutojn kaj decidojn. La kasisto Börje Andersson emfazis la frazon per kiu li finis la ekonomian raporton: "Se ni ne ricevos pli da donacoj, ne eblas porti la nuntempajn kostojn por Esperanto-Centro kaj La Espero". Kelkaj el la partoprenantoj hezitis pri la foruzo de 34 000 kronoj de fondusoj de la lastjara bilanco, kaj pri anticipitaj 20 000 kronoj kiel donacoj en la ĉi-jara budĝeto. La kasisto mem tamen "predikas ŝparemon", kiel li sin esprimis, kaj konstatis ke Esperanto-Gården estis privilegiita investo dum la lastaj jaroj. Aliaj membroj diskutigis la elspezojn por Esperanto-Centro kaj La Espero. Ilin alfrontis pluraj argumentoj favore al la nuna situacio, kun centra oficejo en Stokholmo kaj membrogazeto. Oni klarigis ke ni esperable povos eldoni La Espero pli regule en la futuro, kaj starigis redakcian komitaton por povi plenumi tiun esperon post la demiso de Franko Luin. La jarkunveno malkonsentis pri la propono de Lennart Svensson rilate "simplan stencilitan materialon" kiu kompletigus la revuon, ĉar tio ne malgrandigus la kostojn.

KASISTO AŬ FINANCMINISTRO?

La jarkunveno estis pli favora al alia propono de Lennart kaj de Kerstin Kristoffersson pri centralizita pago de jarkotizoj al SEF. Denove la kasisto, kiu verŝajne estis pli sukcesa en la lernejo ol la financministro de Svedio, donis rimarkon, ke la realigo de la propono povus kaŭzi kromlaboron al la centra respondeculo. Kerstin mem klarigis ke kun longa perspektivo temas pri komputilaj programoj. La registrado de membroj kaj la librotrenado estos farata per la sama programo. La aliaj du proponoj al la jarkunveno estis malaprobataj; tiu de Lennart Svensson pri membrokarto (ĉu mi surprizas vin, se mi diras ke denove temis pri ekonomio) kaj tiu de la klubo en Malmö kiu tamen iel estis aprobita ĉar ni klopodos redukti niajn elspezojn kvankam ne rekte influos la membrokotizojn en Malmö.

Posttagmeze okazis la jarkunvenon de la sveda sekcio de ILEL. Ĝin estris Bertil Andreasson, kaj ĉiuj seĝoj en la apudmangeja salono estis okupitaj. Multaj esperantistoj, ĉu profesiaj instruistoj aŭ ne, interesigis pri instruado de Esperanto. Ekspozicieto de libroj montris ke troviĝas pedagogia literaturo. Ankaŭ posttagmeze oni povis aŭskulti Birger Viggen paroli pri la fascina vivosorto de Harald Tillander, la presisto. Ankaŭ KELI okazigis sian jarkunvenon tiam. La muzeo de Lesjöfors malfermis siajn pordojn por grupo da esperantistoj, kiuj promenis al la najbara kaj verŝajne tre vizitinda vidindaĵo. Dum tiuj malripozaj horoj antaŭ la vespermanĝo oni krome aranĝis aliajn laborkunvenojn kiel ekz. renkontiĝo de la stabo de la somera kurso, kaj konstitucia kunveno de la estraro de SEF. Pli malpli sam-

tempe Wim Posthuma montris sian nederlandan filmon en la televida ĉambro. Espereble futuraj kongresoj disponigos virtualan sozion kiu povus anstataŭi min dum kelkaj aranĝoj.

NEAKUZATIVA FILMO

La holivuda filmo kiun ni vidis vespere estis eksterordinara el la vidpunkto ke la aktoroj fakte dum la tuta filmo parolis Esperanton, la subtitoloj estis en la angla. La nomo de la filmo de 1965 estis Incubus. Komence oni vidas kamparan scenon. Anoncanto diras "En la vilaĝo de Nomen Tuum . . ." Baldaŭ viro renkontas junan, belan virinon. Li falas kaj sin vundas. Ili iras por bani sin. Li falas en la akvon. Ŝi allogas lin. Li falas denove. Ŝi piedpremas lian kapon kiu subakviĝis.

Nigre vestitaj virinoj, ŝiaj "fratinoj", venas al la marbordo. La juna virino esprimas sian deziron kapti puran animon por la dio de malbono, sed estas avertita de la virinoj, kiuj diras ke troviĝas forto kiu nomiĝas amo. La juna virino reiras al la vilaĝo. Tie Kia (pronocita kaja), la ĉefrolulino, spionas junan paron. Li estas kuraĝa soldato, Marc (pronocita mark). Jen la du ĉefroluloj krom Incubus kiu aperos poste.

Se oni ŝatas la filmojn de Ingemar Bergman, oni verŝajne povas ankaŭ alte taksi ĉi tiun filmon. La filmado estas tre estetika, kaj la enhavo ĉefe religia/morala profundigo. Ni tamen kompreneble, malgraŭ la avertoj de Franko Luin, kiu kune kun Janko prezentis la filmon, ne povis ne kritike aŭskulti la prononcon kaj vortfaradon en Esperanto de la aktoroj. Tiuj spektantoj kiuj regis la anglan plurfoje est-

is helpitaj de la subtitoloj, kiam la akcento estis erara aŭ kiam la akuzativo malaperis ("Mi ne havas animoj") k.s. Verŝajne ni pli facile akceptis ke "greno" estis tradukita per "wheat", "danĝero" per "harm" k.t.p., ĉar tamen ni ne certis ke la originala lingvo fakte estis Esperanto kaj ne la angla.

MINEJA FELIĈO

La lastan tagon ni ĉefe dediĉis al ekskurso al eksminejo. Inter Lesjöfors kaj Filipstad situas Nordmark, okcidente de la pli fama Långban. Tie multescia ĉiĉerono, antaŭa inĝeniero, rakontis kaj respondis je demandoj. Ni vidis unue gigantan akvoradon kies diametro estis ĉirkaŭ dek metroj. Ĝi funkciis inter 1836 kaj 1916, sed la minejo estis multe pli malnova, verŝajne de la 13:a jarcento. Antaŭ la alveno de la ŝtonkarbo 10% de la produktokvanto de fero en la tuta mondo venis de la mindistrikto de Filipstad. Antaŭe oni uzis lignokarbon. Ordinara ferfandejo foruzis tutan karbigostakon en du tagoj.

En la proksima Taberg ni vidis minon kiu deglitis en sian kavaĵon unu nokton en la pasinta jarcento. Ni mem subiris en minon kaj konstatis per magneto ke la roko estis magnetita. En profundaj ŝaktoj proksimaj restis ankoraŭ la neĝo.

Ni tamen feliĉis ke ni vivas hodiaŭ aŭskultante pri la vivkondiĉoj de la minlaboristoj. Ili nek rajtis aperi malfrue vespere ekster siaj domoj nek esti ebriaj kaj devis levi siajn ĉapelojn salutante la superulojn. Parto de la salajro povis konsisti en subtera kabano. Se ili fuĝis ili riskis punlaboron.

Resumé på svenska

Efter invigning och auktion i Lesjöfors Folkets Hus hade Esperantoförlaget årsmöte, där bland annat den fortsatta bokutgivningen diskuterades. Den första kvällen ägnades åt diktuþpläsning på transparento – med översättning till esperanto – av Martin Weichert, föredrag av Franko Luin om ett seminarium i Bryssel om rätten till ett internationellt språk, och åt sång och musik av Andrej och Natalia Berce.

SEF:s årsmöte på kongressens andra dag, som blev längre än planerat, handlade mycket om förbundets svaga ekonomi. Kostnaderna för Esperanto-Centro i Stockholm och förbundets tidning *La Espero* är båda tunga utgifter, som ifrågasattes och diskuterades. Önskemål framställdes om en mer regelbunden utgivning av tidningen. Ett förslag om att ersätta tidningen med stencilerade blad avslogs, eftersom det inte ansågs förbättra ekonomin. Mötet beslöt

däremot att upprätta en redaktionskommitté. Ett annat beslut var att inbetalningen av årsavgiften ska centraliseras.

På andra dagens eftermiddag hade svenska sektionen av ILEI, esperantolärarna, sitt årsmöte, Birger Viggen höll ett föredrag om pressmannen Harald Tillander, och KELI, kristna esperantisters förbund, hade årsmöte. Senare på eftermiddagen träffades den nyvalda styrelsen, samtidigt som Wim Posthuma från Västerås visade nederländsk film.

Kvällen ägnades åt att gemensamt bese en Hollywood-film från 1965 med esperantotal, även om uttal och betoning ibland var något tveksam, och ett och annat engelskt ord slank igenom.

Avresedagen ägnades åt ett besök på det gamla gruvområdet mellan Lesjöfors och Filipstad.

Originoj de nomoj homaj

Av Jan Setréus

DE KIE DEVENAS ĈIUJ PERSONAJ NOMOJ? TIU ARTIKOLO TEMAS PRI TIU INTERESA DEMANDO. LA VERKANTO HAVAS MULTE DA SCIOJ KAJ VOLAS DONI ĈION TION AL NI.

En la mitologioj kaj religioj la demando pri la plej unuaj personaj nomoj facile trovas respondon, ĉu Ask kaj Embla, ĉu Adamo kaj Eva, ĉu Enki kaj Ninhursag, ĉu Jutpu kaj Kot. Tamen la plej unuaj konataj nomoj de veraj personoj povas esti tiuj de la unua egipta Faraono Menes kaj lia patro Narmer, kiuj vivis antaŭ pli ol kvinmil jaroj. Tute certe ankaŭ pli fruaj prahomaj estis nomitaj. La rokĉizajoj de norda Eŭropo indikas nomojn antaŭ la skribarto kiel rebusojn de bildoj. Ekzemple troviĝis jam la ankoraŭ kutima nomo Eirik (Eriko) kun la signifo de "potenculo ĉiama" reprezentita per bildo kun la suna dio. La infaneto kies nematura vorttrezoro kutimas ampleksi nomojn de si mem kaj la plej proksimaj homoj kaj dombestoj, eble ne distingas nomojn de pronomoj kaj substantivoj de parenceco.

Troviĝas kulturoj kie oni pli ol en nia evitas la nomojn. La viroj de la janomamoj en Brazilo kaj Venezuelo ne volas esti menciitaj per siaj nomoj, ĉefe ne publike. Povas eĉ okazi ke multjara edzino de viro ne konas lian nomon. Anstataŭe oni povas uzi terminojn de parenceco. Sed ŝajnas ke personaj nomoj ekzistas ĉie kaj ekzistis, iom nebule dirite, ĉiam. Familiaj nomoj estas pli moderna fenomeno. En Ĉinio oni uzas familiajn nomojn ekde la kvara jarcento, kaj en Eŭropo ekde la deknua jarcento.

FONTOJ DE LA NOMOJ

Kvankam preskaŭ sennombraj, el la fontoj de nomoj oni povas distingi kelkajn grupojn tre kutimajn.

1) Nomoj de plantoj, bestoj kaj aliaj naturaj fenomenoj. Ekzemploj de la sveda estas la personaj nomoj Björn ("Oso", knabo), Aster ("Astero", knabino) kaj Sten ("Stono", knabo) kaj la familiaj nomoj Hjort ("Cervo"), Lilja ("Lilio") kaj Berg ("Monto"). Kelkaj nomoj estas kaj personaj kaj familiaj kiel ekzemple Björn. En la Andamanoj oni trovas la personajn nomojn Bol ("Hibisko"), Bani ("Oriolo") kaj Meo ("Stono"). Oni dotis la infanon per nomo antaŭ la naskiĝo, kaj tial nepre estis la sama nomo por la du seksoj. Je pubereco la knabinoj tradicie ricevis novan nomon anstataŭantan la naskiĝ-nomon. Estis nomo de arbo aŭ alia planto floranta je tiu sezono.

En Hindio oni nomas siajn filinojn i.a.

Champa ("Floro"), Himi ("Neĝo") kaj Nirja ("Blua lotuso"). Nordamerikaj popoloj povas uzi kiel familiajn nomojn tradukon en la anglan de siaj nomoj, kiel ekz. Josiah Red Wolf ("Josiah Ruĝa Lupo"). En la kulturo janomama nomoj de forpasintoj ofte estas tabuaj, oni ne rajtas elparoli ilin. Tial oni elektas nomojn pri fenomenoj kiujn oni ne bezonigos en sia vorttrezoro, kiel "Piedfingra ungo de bradipo" aŭ "Vibrisoj de bleksimio".

2) Ofte nomo devenas de geografia nomo, kiel nacio, provinco, urbo aŭ vilaĝo. Tial la filo de la militmaristo Pehr Sjökarl en la vilaĝo Sjökallda unue nomiĝis Pehr Pehrsson Sjökarl, sed kiel militmaristo en la vilaĝo Axmar by nomiĝis Pehr Pehrsson Axman. La familia nomo Al-Tabari de la araba erudiciulo Abu Djafar Muhammed Ibn Djarir Al-Tabari signifas "el Tabaristano". La japanaj familiaj nomoj Ichijo, Endo kaj Sato same rilatas al geografiaj nomoj.

3) Kutimaj estas nomoj surbaze de trajtoj de la posedanto de la nomo. Hindoj povas nomiĝi Lajja ("Modesteco", knabino), Hiya ("Kuraĝo", knabino) aŭ Ajay ("Nevenkebla", knabo). Japanaj personaj nomoj estas Makoto ("Vero", knabo), Isamo ("Kuraĝo", knabo), Hisako ("Longviva", knabino) kaj Shizuko ("Trankvila", knabino). Je la naskiĝo oni ne certas pri la mensaj trajtoj de la infano. Sekve oni povis doni duan nomon al la infano poste kiel la guarasugvoj en Bolivio. La dua nomo povis esti Karadaduinsapo de knabino kiu multe ploris aŭ Coatí de infano kun granda nazo. La vaŝoj en Usono ŝanĝis nomojn multfoje dum la vivo. Kutimaj estis nomoj kiuj priskribis la konduton aŭ aspekton. Familiaj nomoj en la hispana estas ekz. Alegría ("Ĝojo") kaj Rubio ("Blonda").

RANGON EN LA NOMOJ

4) La nomo ankaŭ povas indiki profesion, oficon, rangon k.s., kiel la hispana Alcalde ("Urbestro"), la angla Taylor ("Tajloro"), la alemana Gans ("Ansero", pri bredisto de anseroj), la franca Boulanger ("Bakisto") k.t.p. Ĉu kadre de la merkato aŭ hazarde sveda dentistino nomiĝas Gadd ("Pikilo", slango por dento)?

5) Nomoj kiuj rilatas al la historio aŭ eventoj en la vivo de la individuo estas troveblaj en diversspecaj kulturoj. La



Kiel mi nomu mian filon....? Mi tute ne scias... Jen mi trovis: Mi nomu lin Mattias-son laŭ mia propra antaŭnomo. Ĝi estu lia familia nomo!

akamboj de Kenjo interkonsente kun amikoj kaj parencoj decidas pri nomo por ĵusnaskito. Poste oni aldonas nomojn kiuj rilatas al eventoj en la vivo de tiu individuo.

6) La nomo ankaŭ povas rilati al dioj, sanktuloj aŭ estimataj personoj. Ekzemploj estas la familiaj nomoj Sanmartí kaj Saint-Cyr, kaj la personaj nomoj Pawel ("Paŭlo"), Ibrahim ("Abraham"), Hannibal ("Favoro de Baalo"), Jismael ("Dio aŭdas"). En fora vilaĝeto en Bolivio mi hazarde renkontis viron kiu donis la nomon Björn al sia filo, ĉar li admiris la svedan tenisludiston Björn Borg. En Tanzanio mi havis lernanton kies nomo estis Joseph Tito, eble laŭ idolo de la gepatroj.

KALENDARAJ NOMOJ

7) Nomoj laŭ la kalendaro, la vica numero en infanaro k.s. En la igbokulturo de Niĝerio infano povas havi la nomon de la foira tago kiám ĝi naskiĝis, ekz. la nomon Nwaokorie por knabo. La nomon oni povas preni de la kalendaro. Tio signifas ke oni elektas la nomon de la naskiĝdato. Vicaj nomoj en la japana estas i.a. Ichiro ("La unua filo"), Saburo ("La tria filo") kaj Yoichi ("La dek unua filo"). En la sveda la knaba nomo Börje indikas komencon, do la unua infano. La luoj de Kenjo donas nomojn i.a. laŭ la tempo de la tagnokto, tiel ke la nomo de filo komenciĝas per O- kaj tiu de filino per A-. Ekz. Otieno ("Nokto") kaj Atieno, Odhiambo ("Vespero") kaj Adhiambo.

8) Sonĝo povas ankaŭ doni nomon. La patrino en la komanĉa kulturo en Usono ricevis dum sonĝo de supernatura estaĵo taŭgan nomon por sia infano. Ankaŭ infano de la naskapoĵo kaj aliaj nordamerikaj

popoloj ricevis sian nomon per sonĝo de la patrino. La unue naskita filo de amiko mia ricevis laŭ sonĝo de sia patro la nomon Zerophymyr.

9) Tradicia fonto de nomoj estas la nomoj de prapatroj aŭ aliaj parencoj. La inuitoj ricevis siajn nomojn de mortintoj, kies spiritoj ĉirkaŭvagas. Tiel la ĵusnaskito ankaŭ transprenis la mensan karakteron de la mortinto. En nia lando la unua filo ofte ricevis la nomon de sia patroflanka avo, kaj la dua filo de sia patrinoflanka avo. La unua filino havis la nomon de sia patroflanka avino, kaj la dua filino de la patrinoflanka avino. La gepatroj de la karbigisto Anders Pehrsson en Råhällan en Hille estis Pär Pärsson kaj Helena Larsdotter. Li edziĝis kun la filino Stina Andersdotter de Anders Andersson kaj Anna Göransdotter. Ŝi naskis laŭ kronologia ordo; Helena, Pehr, Anna, Stina kaj Anders. Mi devus aldoni ke mi ŝuldas dankon pri mia ekzisto al ŝi ke ŝi naskis sian filon Pehr.

FAMILIA NOMO DE PATRO

Kiam oni malhavas familian nomon, kiu estis la normala stato de ordinaraj homoj antikve, oni facile povis krei "familian" nomon uzante la nomon de la patro. T.n. patronomoj troviĝas en multaj lingvoj. En la sveda el la patra nomo la knaboj ricevis patronomon per aldono de -son ("filo"), kaj la knabinoj per aldono de -dotter ("filino"). Tiel la kamparano Pher Olofsson kaj lia edzino Karin Jansdotter havis la filon Olof Phersson kaj la filinon Carin Pherdotter. En la rusa la patronoma sufikso estas -oviĉ por knaboj kaj -ovna por knabinoj. Do la grafo Pjotr Andrejoviĉ Tolstoj estis filo de Andrej Vasiljoviĉ Tolstoj. En la hispana la finaĵo -ez ludis similan rolon. La filo de Alvaro adoptis la familian nomon Alvarez, la filo de Gonzalo nomiĝis González. La araboj enmetis la vorton Ibn ("Filo") inter la persona nomo kaj la nomo de la patro. Tiel estiĝis la

nomo Abu Abdallah Mohammad Ibn Battuta de la fama esplorvojaĝisto de la 14-a jarcento. Abdallah signifas "Servisto de Alaho", kaj Mohammad ("Mohamedo") estas la nomo de la profeto. Ĉi tiu nomo ankaŭ malkaŝas alian interesan trajton. La vorto Abu ("Patro") estas uzata por specifi sian idon, simile al la uzo de Ibn por la kontraŭo. Nomo laŭ filo estas fenomeno kiu ankaŭ ekzistas ekz. en kulturoj de la plubarbaro de Amazono, kaj en insularo de Azio.

Vaska familia nomo kiu meritas menciion estas Errotaberrigorrigicoerrotacoechea. Verŝajne oni prononcas ĝin kiel oni literumas ĝin.

PROBLEMOJ PRI SAMAJ NOMOJ

Antikve oni ne bezonis tiom da nomoj pro multe pli malgrandaj kulturaj sferoj. Se nur vivas naŭcent personoj en vilaĝo, kiuj konas unu la alian, sed malmulte vojaĝas, tridek personaj kaj tridek familiaj nomoj sufiĉas por distingi ĉiujn. Sed en lando kun nacia lingvo de naŭ milionoj civitanoj kiuj facile interkomunikigas vojaĝante, korespondante, telefonante k.t.p. oni bezonus trimil personajn kaj trimil familiajn nomojn.

En lando kiel Ĉinio kun pli ol naŭcent milionoj da parolantoj de la sama lingvo oni bezonus tridek mil personajn kaj tridek mil familiajn nomojn. Ĉu oni nepre devas solvi la problemon? Eble ne. Verŝajne troviĝas miloj (aŭ eĉ milionoj) da Wang Chang, Muhamed Ali, John Smith k.t.p. Troviĝas tendenco al diversigo per elekto de novaj nomoj, kvankam loke povas okazi ke oni preferas unuigon per uzo de la sama nomo kiel la sikoj en Panĝabo kun la familia nomo Singh ("Leono"). En la supre menciita ekzemplo de naŭcent milionoj da samlingvanoj, tri nomkategorioj reduktas la bezonon de malsamaj nomoj al ĉ. mil, kaj per du personaj kaj du familiaj nomoj po oni nur bezonus 174 malsamajn nomojn. Eĉ per limigita nombro da nomoj oni

povas krei novajn kombinojn per la aldonado de epitetoj, karesnomoj, dua familia nomo, pluraj personaj nomoj k.t.p. Ekzemple la nevo de Plinio la maljuna estis Plinio la juna. Ekzemploj de francaj reĝoj estis Karolo la Granda, Karolo la Kalva, Karolo la Dika, Karolo la Stulta, Karolo IV la Bela kaj Karolo V la Saĝa.

En la hispanlingva socio oni trovas du familiajn nomojn, la unua de la patra flanko kaj la dua de la patrino. La nomo de la patra flanko estas pli grava. La pentristo Pablo Ruiz Picasso tamen famiĝis sub la nomo de sia patrino Maria Picasso López ne de sia patro José Ruiz Blasco. Se la patro estus nekonata la infano povus eĉ ricevi dufoje la familian nomon de la patrino. Je edziniĝo la hispana virino aldonas la nomon de sia edzo al sia fraŭlina nomo. En Usono kaj Kanado virinoj post edziniĝo ofte retenas kiel unuan familian nomon sian fraŭlinan nomon.

En la rusa lingvo oni uzas kaj patronomon kaj familian nomon de la patra flanko kiel ni jam vidis. Je alparolo oni kutimas neglekti la familian nomon. Same en Islando oni kutimas uzi nur la patronomon, ekz. Baldur Ragnarsson aŭ Vigdis Finnbogadóttir. Ankaŭ en Svedio oni uzis kaj patronomon kaj familian nomon, kiel la paroĥa skribisto kaj provinca polickomisararo Israel Hansson Björkman en la vilaĝo Björke, kiu estis filo de Hans Andersson Björkman kaj Anna Israelsdotter Anthelia. Laŭ modelo de la superaj klasoj du personaj nomoj aŭ pli fariĝis kutimo dum la unua duono de la deknaŭa jarcento inter la svedoj. La unua nomo kutimas esti la voknomo.

En kelkaj lingvoj oni renversis la ordon de persona kaj familia nomo. Sekve la familia nomo de la hungara komponisto Bartók Bela estis Bartók, de la ĉina tablotenisludisto Ĉuang Ce-tung estas Ĉuang, de la japana reĝisoro Kurosawa Akira estis Kurosawa, de la korea esperantisto Lee Chong-Yeong estas Lee.

Esperanto på mellanstadiet

Under rubriken Mellanstadiet läser vi i Norrköpingklubbens medlemsblad:

"Under höstterminen kommer cirka tio elever på mellanstadiet att läsa esperanto. Undervisningen ligger under ämnet 'Elevens val' och är 75 minuter i veckan.

Detta sammanfaller underligt nog med att Wilhelm arbetar där och kan lösa frågan om lämplig lärare."

Medlemsbladets redaktör Haldo Vedin påpekar att det är en av de största nyheterna man någonsin kunnat förmedla.

Låt oss förmoda att det gäller Wilhelm Ternborg i Norrköping. RED

Anoncbanderolo pri Esperanto en Interreto

En nova sveda interreta gazeto *Telegram*, kiu aperigas mallongajn politikajn kaj ĝeneralajn novaĵojn, aperas regule anoncbanderolo pri esperanto, kun ligilo al la interreta informejo de SEF, Sveda Esperanto-Federacio. Aparta anonceto reklamas la Kioskon de SEF kun pli ol dekmil ligiloj al gazetoj internacie. Reciproke eblas legi la plej aktualajn novaĵojn el *Telegram* en Kiosko (nur en ĝia sveda versio). *Telegram* legeblas ĉe <http://telegram.nu/>, Sveda Esperanto-Federacio ĉe <http://www.esperanto.se/>, Kiosko ĉe <http://www.esperanto.se/kiosken/>.

(EL NUN)

Monon por nova PIV

SAT alvokas donaci por la nova eldono de PIV.

La eldonkosto de la nova ĉefverko estos tre alta, kaj pro tio ĝia eldonisto (Sennacieca Asocio Tutmonda) malfermis specifan fonduson. Ĉies helpo estas bona! La nomoj de la kontribuantoj kaj respektivaj sumoj aperos regule en "Sennaciulo".

Se iu ne deziras ke la nomo aperu en tiu listo, ĝi restos anonima. La monon bonvolu sendi al la pĉk de SAT: 1234 - 22 K Paris (Francio) kun indiko: "Por la fonduso de nova PIV".

LUIS GUILLERMO RESTREPO RIVAS (EL NUN)

Apogo por afrikanoj en Berlino

La kongreso en Berlino estis bela, kvankam kelkaj aferoj laŭ mi pereis por fari ĝin vere la lasta antaŭ la nova jarcento, sed kompare kun la sukceso mi povas konkludi, ke ĝi estis sukcesa.

La salutmesaĝoj de Federico Mayor kaj Koffi Annan estis vere kuraĝigaj. La kongreso en Berlino lasis al ni neelĉerpeblan forton por plibonigo de nia komunumo tiel, ke ĝi estu la lumo al la cetera mondo. Ankaŭ plaĉis al mi la salutmesaĝoj de diversaj gravaj homoj i.a. de la EU-parlamentano d-ro Christof Tannert kaj de la germana eksministro pri ekstera politiko, ili kune donas al mi esperon por la venko de esperanto en la venonta jarcento.

GENERALE LA PROGRAMEROJ plaĉis al mi. Ĉar ili estis inter, almenaŭ tiuj kiujn mi ĉeestis, oni ja scias, ke dum la UK estas preskaŭ neeble ĉeesti ĉiujn kunsidojn.

La prelegoj estis interesaj kaj vere bezonataj. Mi ne forgesos la prelegon pri la suneklipso, ĝi estis vere alloga, kaj laŭ mi la tempo ne sufiĉis. Mi ankaŭ povas mencii la kunsidon de la Filozofoj kiun mi ankaŭ tre ŝatis, precipe la novlanĉitan projekton pri la Interreta Simpozio. Mi esperas, ke tiaj projektoj helpos nian movadon dum la venonta jarcento. Vere ni devas ankaŭ postkuri la mondan evoluon. Niaj movadoj estu ankaŭ laŭ la nuna maniero de komunikado.

Mi ne povas nomi ĉiujn, sed tamen ne

forĝos la konversacian rondon, kaj la internacian vesperon en kiu mi amuziĝis.

Kamaradoj el diversaj partoj de la mondo kolektiĝis kaj aŭskultis pri la movado en Afriko, kaj kontribuis al la solvo fortiĝi la movadon en Afriko. Kelkaj el la spertuloj pri la movado en diversaj landoj en Afriko ankaŭ ĉeestis. Afrikaj landoj kiuj havis reprezentantojn tie estas Togolando, Tanzanio, Niĝerio kaj Kamerunio. Ĉifoje ankaŭ unu virino el Afriko povis partopreni la Universalan Kongreson, tio estas paŝo antaŭen por la virinoj en Afriko.

INTER LA RAPORTOJ KIUJ PLAĈIS al la ĉeestintoj estis la vekigo de la virinoj en la movado de Esperanto en Afriko. Ekzemplo estis la virina grupo en Pangani, Tanzanio kiu lernas la lingvon kaj havas projekteton por fortiĝi ilin ekonomie kaj lingve. Tiu grupo kunlaboras kun iu japana grupo kies membroj ankaŭ ĉeestis la diskuton.

Mi volas ankaŭ uzi ĉi tiun eblecon inviti ĉiujn samideanojn en la tuta mondo helpi kaj kuraĝigi tiajn grupojn en Afriko.

Mi mem ne iris al la normala ekskurso sed iris kun miaj adventistaj kolegoj viziti adventistajn lokojn inter alie la malsanulejo posedata de adventista organizo proksime de Berlino, la altlernejo de Friedensau kaj ankaŭ la adventista domo kaj preĝejo en Witternberg. Mia ekskurso estis la plej bona laŭ mi, sed kiam mi renkontis la aliajn kongresanojn ili ankaŭ rakontis al mi, ke ili havis bonajn ekskursojn kaj bele

organizitajn, ĉefe en la urbo Berlino kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. La organizintoj elektis la plej taŭgajn lokojn por la ekskursantoj. Danke al la LKK.

MI ESPERAS, KE LA KONGRESA rezolucio estos bone traktata pro ĝia alvoko. Ĉar ĝi alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, al ties instancoj, al ĉiuj internaciaj forumoj, al la nereĝistaraj organizaĵoj kaj al la uzantoj kaj parolantoj de Esperanto tra la mondo, doni gravan atenton al tiuj ĉi aspektoj de tutmondiĝo, kaj klopodi direkti la procezon tiel, ke ĉiuj homoj de la terĝlobo profitu el ĝi. Tio povas nur okazi ĉe senkondiĉa respekto de ĉiuj homaj rajtoj inkluzive de la rajtoj je lingva kaj kultura diversecoj.

Mi dankas al UEA por inviti kelkajn afrikanojn partopreni la Universalan Kongreson ĉar tiu estas la plej granda aranĝo en Esperantujo. Mi mem dankas ankaŭ al sinjorino Eva el Berlino, Germanio kiu garantiis kaj pagis por mi la tuton al UEA. Vere sen ŝi mi ne povus partopreni la UK-on.

Mi ankaŭ dankas al ĉiuj amikoj en Svedio kiuj ebligis mian viziton al Svedio post la UK en Berlino, pere de Anita Dagmarsdotter kiel motoro, inter alie la stokholma klubo, Esperanto-Gården, Esperanto-Institutet kaj aliaj kiujn mi ne povas mencii ĉi tie pro manko de spaco. Tia amikeco estas la plej bezonata por nia movado. Ĉiuj svedaj samideanoj estas bonvenaj al Tanzanio.

COSTANTINE MASHAURI

Honorado al Seppik en Tallinn

Okaze de sia 70-jariĝo la Esperanto klubo de Norrköping decidis aranĝi vojaĝon al Tallinn. La ideo estis kombini distran semajnfinan ekskurson kaj honorigon de Henrik Seppik, la fama estono kiu gvidis amaskurson en Norrköping en 1929 kaj tiel ebligis la fondaĵon de la klubo...

La pentekostan vesperon je la 13-a la vojaĝo komencis...

Post atendo por pasporta kontrolo ni trovis ke grupo de estonaj samideanoj estis en la haveno por bonvenigi nin. Ni interkonsentis pri renkonto post nia jam mendita urba rondvojaĝo.

...ni denove eniris la buson por vidi iom de la antaŭurboj kaj i.a. la loko por la grandaj kantfestoj por kiuj Estonio estas konata. La scenejo tie estas vere impona kun loko por ne malpli ol 30.000 kantantoj samtempe. La tuta rondvojaĝo finis ĉe la

granda hotelo Viru kie ni havis lunĉon.

Tuj post la lunĉo niaj estonaj amikoj veturigis nin al la tombejo kie nun ripozas Klara kaj Henrik (aŭ Heinrich kiel estas skribite lia nomo sur la tomboŝtono) Seppik. Ni metis sur la tombon vazon kun floroj kiujn ni antaŭe aĉetis en la urbocentro kaj honoris lian memoron dum silenta momento. Estis interese vidi ke la tombejo estas t.n. arbara tombejo de la 30-aj jaroj, do preskaŭ same aĝa kiel la fama arbara tombejo de Stockholmo.

Post vizito al la tombejo ni estis veturigitaj al la ejo de la Esperanto-Asocio de Estonio, kiu troviĝas en la absoluta centro de la urbo, nome ĉe la urbodoma placo en la malnova urbo. Dank' al bonaj rilatoj kun la ministerio pri edukaj aferoj la esperantistoj povas senpage disponi lokon en tiel prestiĝa kvartalo.

Sep esperantistoj venis por akcepti nin...

Ahto Kaljusaar kaptis la okazon kaj intervjuis kelkajn de ni por posta elsendado [en la Estona Radio. Red].

La tempo rapide forflugis dum gaja interparolado kaj kafrinkado, kaj baldaŭ estis tempo por reveni al la pramŝipo. Ni preferis promeni kaj Virve Ernits akompanis nin al la haveno. Dum la promeno ni subite vidis grandan rompitan ŝtonarkon. Esits la memorejo por ĉiuj kiuj pereis kun Estonia. Sur granda ŝtono estis engravuritaj iliaj nomoj kaj ni ankaŭ trovis tiujn de Angerd Engberg kaj ŝia edzo Arne. Dua momento de pripensado dum tiu tago tiel plena de travivaĵoj.

Post pasporta kontrolo ni denove eniris "nian" ŝipon. Kaj starante ekstere en la suno ni vidis la multnombrajn turojn malpligrandiĝi...

HALDO VEDIN

Kien La Espero?

Ĉiu kunlaboranto en la esperantista komunumo havas la absolutan rajton uzi sian laborforton kaj sian monon laŭ propra plaĉo kaj plezuro. Tamen, ne estas sen intereso ankaŭ la efikeco. La situacio en Svedio estas tia, ke diskuto ĝuste pri celoj kaj efikeco ŝajnas bezona, kaj diskuto, kiu povas okazi en jarkunvenoj, estas tempe tiel limigita, ke ĝi riskas esti ne sufiĉe ĝisfunda. Tial mi volas, tute senmalice, iniciati debaton sur la paĝoj de La Espero.

EN LA JARKUNVENO DE SEF ekonomiaj demandoj dominis. La du plej pezaj elspezoj en la buĝeto estas Esperanto-Centro kaj La Espero. Jen kiel skribas la kasisto: "Demando estas, kiel longe organizo kun ĉirkaŭ 1 000 pagantaj membroj, povas administri kaj Esperanto-Centron en Stokholmo kaj monpostulan gazeton, nome La Espero." Ĉi tie mi volas diskuti nur La Esperon.

La gazeto dum kelkaj jaroj montris sin neakurata rilate al eldonatoj kaj nombro da numeroj. Kiam numero 1 venis ĉi-jare, tiam la limdato por manuskriptoj estis jam pasinta, kaj la alvoko al la SEF-jarkunveno estis plursemajne malfrua. Ĉar la tuta laboro krom presado estas idealisma kaj nepagata, tio ne estas tre stranga kaj neniun mi volas riproĉi pro tio. Tamen, ĝi glutas la duonon de la membrokotizoj. Troviĝas do motivoj por analizi kaj debati la situacion por prepari grundon por prudentaj decidoj pri problemoj, kiuj neeviteble leviĝos en la venonta jarkunveno de SEF.

KIUJN TASKOJN NACIA ESPERANTOPERIODAĴO HAVU (se ni volas labori racie)? Ĝi devas

1) informi pri tio, kio okazas en la movado de la lando. Per movado mi celas ĉiujn esperanto-organizaĵojn kaj instituciojn en la lando. En Svedio troviĝas – krom klubomembroj de SEF – almenaŭ dek tiaj.

2) per sia ekzisto ebligi inter-informadon, inspiradon, debaton kaj kontaktojn inter tiuj organizaĵoj, kluboj kaj personoj.

3) vekti pozitivan interesecon por finlerno de esperanto kaj uzado de esperanto en ĉiuj eblaj situacioj. (Informmaterialo por interesatoj estas jam alia afero.)

Kion tia gazeto ne devas taski al si, estas plenumo de rolo kiel ĝenerala kulturmagazino. Tio estas por esperanto rekte kontraŭproduktiva. Per misdirektata ambicio tia gazeto konkuras kun la internaciaj pri la etaj tempo kaj mono disponeblaj de la leganta publiko.

Jen kion nacia esperantogazeto laŭ mia opinio devas plenumi:

- 1) veni regule kaj ĝustatempe
- 2) esti fizike simpla kaj laŭ enhavo limigita, tiel ke ĝi ne konkuras kun internaciaj gazetoj.
- 3) esti sendependa, t.e. raporti pri kaj direkti sin al ĉiuj esperanto-uzantoj/-organizaĵoj en la lando. SEF, kiu tamen estas la plej granda esperanto-organizaĵo en la lando, povas, se volo por tio ekzistas, eksplicite komisi al redaktoro aŭ redakta stabo eldoni sendependajn.
- 4) esti financata per abonkotizoj (kaj donacoj) kaj ne per membrokotizoj. Se iu opinias la gazeton nenecesa aŭ malbona aŭ ke ĝi ne venas ĝustatempe, tiu ne bezonu pagi ĝin. Se oni nuntempe tiel opinias pri La Espero, estas risko, ke oni forlasas SEF pro tio kaŭzo. Ke tio fakte okazas, atestas jena linio en la SEF-agadraporto de 1997: "Kiam La Espero longtempe ne aperis, multaj membroj ne volis pagi la kotizon."

LA ESPERO PLENUMAS NENIUN el la supraj kondiĉoj kaj mi sugestas: Nuligu La Esperon en ĝia nuna formo, ĉar dumlonge ĝi estis objekto de iritiĝo por la membroj, kaj startigu simplan, sendependan kaj regule venantan gazeton, kiu direktas sin al ĉiuj esperanto-uzantoj en la lando, financatan per abonkotizoj! Kluboj povos mem decidi, ĉu ili volas inkluzivi tiun gazeton en sia klubmembra kotizo aŭ ne, kaj se ili volas, ili eĉ povas mem distribui ĝin kune kun sia klubgazeto. Kiam la estraro de SEF trovas necese, informfolio kun la nomo La Espero povas esti presita kaj sendata al la membroj de SEF kune kun tiu nova gazeto. Tio ŝparus monon kaj al SEF kaj al la kluboj, kaj tiu mono povus esti uzata por malaltigi la membrokotizojn aŭ por saĝe elektita agado, laŭplaĉe.

Mi antaŭvidas, ke multaj legantoj de la supraj linioj pensos, ke la problemoj ne estas tiom seriozaj, ke per unu aŭ alia provizora ŝanĝo ni iun solvon atingos. Povas esti, sed atentu, se ni ne funde analizas la situacion kaj radikale solvos ĉiujn problemojn, ni riskas, forperdante forton kaj monon, duonsolvi problemojn, kiuj revenos eĉ pli akute kaj severe post kelkaj jaroj!

Bonvolu konsideri ĉi tiun proponon al la venontjara SEF-jarkunveno.

Nu jen, tio estas mia vidpunkto rilate al La Espero. Mi kredas ke troviĝas aliaj, kaj mi estas certa, ke la legantoj ne silentos pri ili.

BERTIL NILSSON

Ne perdu La Espero-n!

Nenio nova sub la suno aŭ historio repetiĝas aŭ kelkaj pensoj pri LaEspero. Trafoliumante malnovajn numerojn de La Espero de la postmilitaj jaroj frapas min la simileco de la tiama kaj nuntempa statoj de certaj cirkonstancoj. La financaj rimedoj por la gazeto apenaŭ sufiĉis jam tiam, malgraŭ la fakto, ke estis speciala abona prezo kaj speciala parto de la membrokotizo iris al la gazeto. Verŝajne, kiel kulture oni kalkulis kostojn tro avare kaj sekve oni bezonis konstante peti monon uzante diversajn allogaĵojn ekz. "trovu kvin novajn abonantojn kaj vi gajnos libron".

La nombro de SEF-membroj estis inter 1 000 kaj 1 400. Kiom estis ne membroj, sed nur abonantoj de la gazeto, ne eblas konstati. En protokoloj de SEF-jarkunvenoj ne estis notitaj la preciza kosto de La Espero aŭ la eldonkvanto. Tamen, dum tiu periodo i.a. F. Szilagy kaj T. Morariu aktivis kun kursoj tra la lando kaj oni povas supozi, ke aperadis multaj novaj abonantoj.

La gazeto estis eldonata foje monate(!) kun 12 paĝoj je la formato A4. Restas nur admiri kaj respekti la redaktorojn kaj iliajn kunlaborantojn por tia sinoferema laboro.

Kion do fari nun? Peni sin treni kiel dum jardekoj aŭ pripensi iun radikalan ŝanĝon por rompi la historian ripetadon.

ANITA BERGH

Ungdomskurs med Atilio Rojas 2-5/11



Kurs i världens lättaste språk för ungdomar under höstlovet.

Plats: Esperanto-Centrum, Vikingagatan 24 (T-bana S:t Eriksplan).

Grundkurs tis 16-18.30, ons-fre 14-17. Forts.kurs tis 19-21.30, ons-fre 14-17.

Lärare: Atilio Rojas från Argentina

Kostnad: 150 kr

Anmälan: Betala på pg 5133 01-2 (Ange namn o nivå)

Mer information: E-posta till <seju@esperanto> eller ring Håkan Lundberg på telefon 08- 717 78 69.

Estraj!

Atilio rakontas pri siaj spertoj la 6:an de nov, 16-18 en EC. Ĉiuj bonvenaj!

Sten Svenonius
Vendelsfridsq 4C
21764 Malmö



Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

KULTURO

Pri Internacia Societo de Historio

Mi estas historiisto kaj serĉisto. Mi verkis kelkajn artikolojn pri la esperantista movado de Kebekio kaj pri homaranismo. Mi konstatis ke estis malfacile serĉi dokumentojn kaj informojn pri nia movado, ĉefe en Nordameriko ĉar ni havas nek centralizitajn arkivojn nek reton de serĉistoj. Mi estas konviktita ke multaj esperantistaj historiistoj alfrontis tutmonde tiun ĉi problemon.

Do, mi proponas al ĉiuj esperantistaj historiistoj (amatoraj kaj profesiaj) fondi fakan societon au reton/ kiun ni povus eble nomi INTERNACIA SOCIETO DE HISTORIO aŭ iu ajn taŭgan nomon. Krome, utilas tiu reto por publikigi, eble en elektronika revuo aŭ per aliaj rimedoj, la serĉadojn sub formo de artikoloj, notoj aŭ libroj.

Bonvolu skribi al Michel Clément Ph.D.
Retadreso: <clementm@altavista.net>
aŭ <clement.michel@uqam.ca>
TTT-paĝo pri historio:
<<http://www.er.uqam.ca/nobel/33440/premier.html>>

Montrealo, Kebekio, la 4-an de marto 1999.

Ingemar Nordin en sveda ĵurnalo

FINE DE JULIO unu el niaj plej grandaj gazetoj Svenska Dagbladet (La Sveda Taggazeto) publikigis duonpaĝan artikolon pri esperanto kaj nia elstara esperantisto Ingemar Nordin, kiu antaŭ nelonge fariĝis 85-jara. Ni elkore aliĝas al gratulantoj kvankam malfrue kaj esperas, ke post tiu ĉi bona reklamo eĉ pli da homoj trovos la vojon al liaj kursoj por lerni esperanton.

(El LA HIRUNDO 6)

Vivo kaj morto de Wiederboren

Ĉi tiu libreto enhavas dek du originalajn novelojn de diversaj

verkistoj. Laŭ la eldonisto ĝi estas eldonita por "novaj esperantistoj". Sed mi ne kredas ke ĝi estas speciale bona por komencintoj pro la lingvonivelo. Estis nur la du lastaj rakontoj kiuj vere plaĉis al mi, "Tre moderna fabelo" de Ferenc Szilágyi kaj "Spiona rondo" de Johán Valano. Multaj de la aliaj noveloj mi trovas sufiĉe malinteresaj, eble parte de tiu impresio estas ke fojfoje la lingvo estas tro komplika

por mi. "Legu kaj lernu" estas skribite je la antaŭflanko de la novelaro sed laŭ mi oni ne postulu ke "novaj esperantistoj" uzosian vortaron tro ofte dum lernlegado!

Do por vi kara komencinto kiu serĉas bonan libron por plibonigi vian Esperaton mi anstataŭ rekomendas "Vere aŭ Fantazie" de Claude Piron kaj eble poste vi povus provi "Vivo kaj morto de Wiederboren" kiam via vortprovizo estos pli granda.

HAKAN LUNDBERG

KRUCVORTA ENIGMO

Tyvär har vi inget korsord att erbjuda denna gång. Lennart Persson i Leksand som förtjänstfullt fullgjort uppgiften att ständigt förse oss med nya korsord kan p.g.a. sjukdom inte längre göra detta. Vi uttrycker härmed en stor tacksamhet för hans mångåriga och pålitliga bidrag till tidningen som livat upp denna till mer än bara ett informationsblad. Vi kommer att sakna hans fyndiga och felfria korsord.

Det är redaktionens förhoppning att någon av våra läsare skulle vilja axla Lennarts mantel, även om vi inte kan kräva samma ambitionsnivå som Lennart hade. Hör av er till redaktionen!

Red

SOLVO DE LA KRUCVORTO 99/1

| | | | | | | | | | | |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A | B | C | C | D | E | F | G | G | H | |
| 1 | A | R | I | T | M | E | T | I | K | O |
| 2 | F | E | R | I | O | J | N | U | R | |
| 3 | R | A | | P | R | O | T | E | Z | O |
| 4 | I | G | L | O | | J | A | R | O | |
| 5 | K | I | U | J | N | | S | T | A | B |
| 6 | O | S | | A | N | K | A | R | O | |
| 7 | N | | E | S | T | U | | J | A | R |
| 8 | | A | M | P | U | L | O | | B | I |
| 9 | A | M | P | E | R | O | N | | O | T |
| 10 | | B | I | Z | O | N | O | | J | A |

KORESPONDADO

Franco volas korespondi kun gesam-ideanoj de Svedio:

S-ro Jové Marcel
222, Chemin de Pascal
83140 Six Fours Les Plages
Francio
tel. 009-33-94 74 82 08

Membro de Portugala Esperanto-Asocio volas korespondi kun svedoj/-inoj. Li estas 63-jaraĝa kaj vivas en Lisbono. Li estas mekanika inĝeniero emerita kaj havas plurajn ŝatokupojn, interaliepsikologion, naĝadon en la plaĝo dum somero, aŭ veturadon dum la tuta jaro.

Li volas korespondi kun gesvedoj de diversaj aĝoj (20 ĝis 70 jaroj):

S-ro José Pereira Reis
Rua Escola de Medicina Veterinária, 2 - 5° E
1000 - 128 Lisboa
Portugaliao

Blinda virino, akompanita en UK en Berlino de sia adulta filino, komencantino, petis pri korespondamiko por la filino:

Elena Siskalova
Poselkova 11
Taganrog
347900
Rusio

Volas korespondi:

S-ino Maki Origuchi
Takayama Manshon 302
Kitanaqao cho 2-2-9
Sakaishi Osakafu 591-8043
Japanio